Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Novembro-Decembro 2017 | n-ro 11-12 (1349-1350)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

En la jaro 2016, Mikaelo Bronŝtejn publikigis ĉe la moskva eldonejo Impeto la 564-paĝan historian romanon "Mi stelojn jungis", kiu atentokapte traktas la periodon 1917-1937 en Sovetio el la vidpunkto de pluraj roluloj, fikciaj kaj realaj, inter kiuj estas pluraj SAT-anoj. La librotitolo aludas al la ĉi-tie reproduktita poemo de Eŭgeno Miĥalski, unu el la multaj viktimoj de la stalinismaj grandaj purigoj de la jaroj 1936-1938. La vizaĝo aperanta sur la kovrilpaĝo estas tiu de alia figuro, ombroplena sed nepre konenda por kompreni tiun ĉi periodon: Ernest Drezen. En sia postparolo, Bronŝtejn klarigas, ke lin puŝis al verkado la deziro konigi tiujn malhelajn paĝojn el la homa historio al la postaj generacioj, por ke ili lernu el ĝi. Tio eĥas al la propono de k-do Mintz (p. 19), des pli ke inter la mortpafitoj en Odeso la 24an de novembro 1937, estis L. Ivn, unu el la intimaj amikoj de Miĥalski. Ivn en 1926 publikigis ĉe SAT satiran novelaron "Ruĝo kaj blanko" pri la vivo en la postrevolucia kaj postmilita Sovetio. Ĝi estis unu el la dokumentoj konsultitaj de Bronŝtejn dum la preparo de sia libro. Notinde ankaŭ estas, ke parto el la enlibre neuzita esplormaterialo uziĝis por memstara eseo, titolita "Sortoj Frakasitaj" (Impeto 2017, 50 p.).



Fotomuntaĵo de Cez




VINKO MARKOVO

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen, depende de la hemisfero, "aŭtuno en la printempo" aŭ "printempo en la aŭtuno", t.e. novembro-decembra numero de Sennaciulo sendita presejen komence de aprilo. Responde al la referendumilo, jam venis tri helpoproponoj al la redaktejo. Tio jam estas kuraĝiga paŝo, sed pliaj homfortoj daŭre estas necesaj. Ankaŭ pri alia temo la nova PK bezonos helpon. Post la SAT-kongreso en Kragujevac, pri kiu vi ankoraŭ povas legi ĉi-numere, ankoraŭ ne estas precizaj proponoj por la postaj jaroj. La PK esploras solvon por 2019, sed jam ankaŭ por 2020 necesus antaŭprepari la terenon. Ĉu vi havas ideojn tiurilate ?

La nuna Sennaciulo estas denove riĉa je debat-vekaj temoj. La nunaj militstreĉoj en la azi-pacifika regiono, la centjariĝo de la morto de Zamenhof, kaj la rememoroj pri la rusa kaj hispana revolucioj estas temoj, kiuj levas samajn demandojn: ĉu ni nur celas esti kvazaŭ-eksteraj observantoj de la nuna mondo, aŭ ĉu ni iel povas kontribui al ĝia transformiĝo? Kiamaniere ni utiligu la pasintajn spertojn, kaj nutrite de ili malfermu novajn vojojn por la estonteco ? Parton de la respondo donos al ni la venonta Sennaciulo, kiu kiel kutime estos la rezulto de via kontribuemo.

La redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 3-4/2018 (1351-1352) : 20a de aprilo

Sennaciulo 5-6/2018 (1353-1354) : 20a de majo

Frontpaĝa bildo: *Elegio* de Miguel Hernández.
Aŭtoro: Serĝo Sir'.

# Enhavo

Enhavo


### Inter memoraĵoj kaj aktualaĵoj
4 Guberniestrino de Tokio ne sendis funebran leteron pro masakritaj koreoj KATO Naoki
5 Trump vizitis Japanion kaj aziajn landojn HORI Jasuo
6 Universala Manifesto de Esperantistoj Kontraŭmilitaj
8 Ne tiom universala manifesto
9 Diverslingvaj esperantistoj en varsovia omaĝo al Zamenhof Miguel FERNÁNDEZ

### Tra la mondo - Kurdio
12 Intervjuo al Muharren Erbey

### Tra la mondo - Latvio
14 Unuamaja festo sub ruĝa standardo Andrej FATARĈUK
14 Veterana unuiĝo
15 Festo de la 1-a majo en Rigo Nikolaj KABANOV
15 Ni ne volas esti "antaŭa tranĉeo de NATO"!

### Tra la mondo - Ekvadoro
16 Por posteno de prezidento de Ekvadoro estis elektita LENIN

### Sindikatismo tutmonda
16 Alĝerio: Nova atako de la registaro kontraŭ sendependa sindikato de la energio-sektoro
17 Kartvelio: Estas tempo adopti novan laborleĝon
17 Irano: Esmail Abdi denove en malliberejo - Liberigu lin tuj
17 Turkio: Ŝikaj vestaĵoj, aĉaj traktadoj: sponsoro de la teamoj de Bundesliga maldungis membrojn de la sindikato

### Laborista historio
18 Kial oni ne trovas la sepultejon de la esperantisto Andrés (Andreu) Nin? Frank MINTZ
19 Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? Frank MINTZ

### Beletro
20 Vivu la "ĝenerala kulturo"! Por ĉiuj! Roland PLATTEAU
21 Monaj ĉifonoj (6) Espopore

### SAT-anoj aktivas
22 Hispanlingva prezentado de la E-libro *Tagoj kaj ruinoj* en Madrido Miguel FERNÁNDEZ
24 6 junuloj aliĝis al SAT dum Japana Kongreso MIYAZAWA NAOTO
25 ReVe: Renkontiĝo Vegana de la 9a ĝis 13a de majo en Greziljono

### Nekrologo

### Tra Esperantio
27 Alvoko helpi por handikapula dormĉambro
31 Atentigo al evidente talentita juna samideano Andreo PENK
31 Socio-ekonomika situacio de Benino: Kie ni staras? Luc TONI

### 91a SAT-kongreso
28 Renkonte al SAT-Kongreso en Kragujevac Bojana ALFIREVIĈ
29 Aliĝintoj

### El la SAT-Administrejo
30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj
19 Novaj aliĝoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***